Ulrich
Hub

# La arkeo foriras je la oka



LA ARKEO FORIRAS JE LA OKA


Originala titolo :
*An der Arche um Acht*
© 2007 Patmos Verlag GmbH & Co. KG
Sauerländer Verlag, Düsseldorf

Tiu ĉi libro estas libere esperantigita. Bonvolu aĉeti nacian version se vi uzas ĝin ĉu rete ĉu komputile aŭ papere.
Ankaŭ pro tio, la bildoj estas intence malbonkvalitaj.

Se vi preferus eldoni ĝin laŭleĝe, konsideru ĉi tiun provon kiel esploron de la merkato.

ULRICH HUB

# LA ARKEO FORIRAS JE LA OKA



DESEGNAÎOJ DE JÖRG MÜHLE

Esperantigis Cyrille Hurstel.
Lingve konsilis István Ertl.


Reviziis Marion Bélisle, Christof Krick, Jesper Jacobsen, Edmund Grimley-Evans.
Dankon al ĉiuj pro la kunlaboro.



Ie en la mondo, en la lando kie ĉio estas neĝa kaj glacia. Maldekstre kaj dekstre, oni vidas nenion ajn krom neĝo kaj glacio, glacio kaj neĝo, kaj plu neĝo kaj glacio.

Rigardante zorgeme, oni ekvidas tri siluetojn. Tri malgrandaj kunpremiĝintaj siluetoj rigardas la pejzaĝon. Ili turnas la kapon maldekstren, kaj poste dekstren, kaj ĉio kion ili vidas, estas nur neĝo kaj glacio, glacio kaj neĝo, kaj plu neĝo kaj glacio.

## LA ARKEO FORIRAS JE LA OKA



Rigardante eĉ pli zorgeme, oni konsciiĝas ke temas pri tri pingvenoj. Ili kvazaŭ samaspektas sed, tio estas tute normala : ĉiuj pingvenoj estas similaj inter si. Vidinte unu, ĉiujn oni vidis.

Rigardante eĉ pli zorgeme, oni tamen rimarkas diferencon. Unu estas iom malpli granda ol la aliaj. Sed atentu ! Oni ne tro proksimiĝu al pingvenoj. Bone, ili estas nedanĝeraj, sed ili fiŝe fetoras.

- Vi fetoras, diras la unua pingveno.
- Ankaŭ vi ! diras la dua pingveno.
- Ĉesigu la disputon ! diras la pingveneto piedfrapante ambaŭ.

Kiam pingveno piedfrapas alian, tiu ĉiam redonas iom pli forte la frapon.


## LA ARKEO FORIRAS JE LA OKA

Rapide akriĝas la kverelo. Je la fino, la tri pingvenoj falas en la neĝon kun granda aĉ-bruo, kaj stulte rigardante unu la alian, ili diras :
- Kial ni ĉiam tiel akre kverelas ?

Tagon tago sekvas, sed tiel similas. La pingvenoj rigardas la pejzaĝon, observas unu la alian kaj post nelonge ili ekkverelas.
- Kiam okazos finfine io ? ĝemas la pingveneto.

Ĝuste tiun tagon, io finfine okazas. Io nekutima. Io malgranda kaj flava. Ĝi tri fojojn ĉirkaŭflugas la kapon de la pingvenoj, kaj surneĝiĝas.

- Papilio !



La pingvenoj tiom feliĉas ke ili eksaltetas kaj entuziasme svingas la flugilojn.

La apero de tiu papilio estas komenco de granda katastrofo, sed tion ili komprenos nur poste…[1]
Ili proksimiĝas singardeme, kaj rave miras la papilion. Neniam ili vidis ion pli belan.

- Mi dispremos ĝin ! diras la pingveneto.
- Lasu tiun papilion en paco ! ekrespondas la du aliaj.
- Sed mi volas dispremi ĝin !
- Ne mortigu.
- Kiu diris tion ?
- Dio, ĥore respondas la du aliaj. Dio diris « ne mortigu[2] ».
- Ha ! ekdiras la pingveneto.

Iom pripensinte, li demandas :

- Sed, kiu estas, tiu Dio ?

Pridemandite pri la dia identeco, pingveno ne precize scias kion respondi.

- Ho, Dio, balbutas la unua…malfacila demando…Dio estas granda…Li estas tre potenca…Li ordonis amason da reguloj, kaj kelkfoje li koleras kiel cent diabloj se oni ne obeas ilin. Krom tio, li estas tre ĉarma.

---

[1] Noto de la tradukinto : oni nomas ĝin « papilia efekto »
[2] Eliro 20.12

- Li havas nur unu malavantaĝon, aldonas la alia.
- Kiun ?
- Li estas nevidebla.
- Tio estas grava malavantaĝo ; diras elrevigite la pingveneto. Se Dio estas nevidebla, neniu certas ke li vere ekzistas.



La du pingvenoj observas unu la alian per ĝenita mieno. Ili finfine demandas al la pingveneto :

- Rigardu ĉien ĉirkaŭ vi, kaj priskribu precize ĉion, kion vi vidas.
- Neĝon, respondas la pingveneto sen moviĝi ĉar tio evidentas.
- Sed krome ?
- Glacion.
- Sed krome ?
- Neĝon.
- sed krome ?
- Neĝon kaj glacion, glacion kaj neĝon, kaj plu neĝon kaj glacion.
- Kaj kiu kreis ĉion ĉi ?

- …Ĉu Dio ? dubeme demandas la pingveneto.
- Ĝuste ! kapjesas la du aliaj. Kaj kion vi pensas pri ĉio ?
- Li verŝajne ne havis multe da imagopovo kiam li kreis bankizon.

La du aliaj tremas kaj nervoze okulumas al la ĉielo.


- Silentu ! Li aŭdos vin ! ili flustras. Dio havas grandajn orelojn, kaj li ja kreis pingvenojn !
- Do li verŝajne konfuziĝis. Ni estas birdoj, sed ni fiŝe fetoras ; ni havas flugilojn sed ne scipovas uzi ilin…
- …Sed ni kapablas naĝi !!!

Estas vere. Pingvenoj estas lertaj naĝantoj sed malfacilas babili kun ili. Ili estas obstinaj kiel kaproj.

- Ĉiuokaze, Dio multe pli zorgeme kreis papilion, aldonas la pingveneto. Ĉar per siaj flugiloj papilio povas flugi ĉien kien ĝi volas.
  Tio maljustas. Pro tio mi dispremos tiun papilion !

- Se vi faros tion, oni punos vin ! avertas la du aliaj.
- Kiu punos min ?
- Dio.
- Pri tio mi dubas, diras la pingveneto.

Kaj li levas piedon, ĝuste super la papilion.



Li mistrafas, precize pro du vangofrapoj. Unue la pingveneto estas konsternita, poste li ekploras tutkorpe.

- Jes ja, jes ja, ploru, diras la du aliaj. Vi ĉiam malobeas. Ĉion tri fojojn ni devas ripeti. Vi estas aĉa pingveno !

Neniu pingveno ŝatas esti taksata malbona, sed la pingveneto ŝajnigas ke li fajfas pri tio. Li sidiĝas en la neĝon.

- Kaj kio ? Ekzistas bonaj kaj malbonaj pingvenoj, kaj mi estas malbona. Mi ĉiam estis tia. Ne mi kulpas. Dio kreis min tia !

La du aliaj pingvenoj hororplene kaŝas sian vizaĝon per la flugiloj :

- Ha !! Vi sidiĝis sur la papilion !

La pingveneto ekstaras kaj rigardas ĉien ĉirkaŭ si. Ĝuste kie li sidis, kuŝas en la neĝo la dispremita papilio.




Ĝi plu estas flava papilio, sed ĝi ne plu flugas. Ĝia maldekstra flugilo estas tute ĉifita.

La tri pingvenoj kliniĝas super la papilion.

- Ho, li mortis, kia malfeliĉulo ! diras unu.
- Li nun iras al la paradizo, aldonas la alia.
- Ĉu ĉiuj mortintaj papilioj iras al la paradizo ? demandas la pingveneto.
- Ne, ne ĉiuj. Nur tiuj, kiuj bone kondutis. Ĝuste vi, vi ne iros.
- Kial, ĉu mi ne bone kondutis ?


La du aliaj pingvenoj kapneas.

- Vi ĵus mortigis papilion.
- Sed mi ne intence faris !
- Vi diris ke vi volas dispremi ĝin.
  Rigardu, li estas tute dispremita nun ! diras la du pingvenoj montrante la senmovan papilion sur la neĝo.




Certe Dio ne ĝojas pro tia vido.

- Eble li ne rigardis, flustras la pingveneto.
- Dio ĉion vidas. Kiam vi mortos kaj deziros iri al la paradizo, li persone atendos vin ĉe la pordo por kelkaj demandoj…
- Ĝis tiam, diras la pingveneto, provante kaŝi la tremon de sia voĉo, li estos forgesinta delonge tiun papilion.
- Ĉu tion vi kredas ? Dio havas komputilan memoron ! Li neniam forgesas puni la kruelajn pingvenojn.




- Kiajn punojn li donas ?



- Tio estos surprizo ! diras la du pingvenoj ekrigardante unu la alian. Li povas havi malfortan imagopovon por krei bankizon, sed svarmas liaj ideoj por puni.
- Mi kredas ke li ne ekzistas ! diras la pingveneto, dum li stamfas sur la glacion. Vi inventis lin por timigi min ! Mi ne bezonas Dion ! Ĝis nun, mi tre bone elturniĝis sen li, kaj vi…

Ĝuste tiam liaj okuloj pleniĝas je larmoj.



- Kaj vin, daŭrigas li plorĝeme, ankaŭ vin mi ne bezonas ! Mi rifuzas amikojn, kiuj celas timigi min. Mi neniam plu volas vidi vin !


Kaj li tiel rapide foriras ke neĝonuboj leviĝas malantaŭ li.

La du konsternitaj pingvenoj rigardas lin malproksimiĝi.

- Kio okazis al li ? demandas la unua.
- Eble li pravas, respondas la alia. Mi neniam vidis Dion, nek renkontis iun, kiu vidis lin. Li povus aperi iam kaj tiam…
- Silentu ! li observas nin ! Ĉu vi ne sentas ? Rigardu la ĉielon !

Ili levas la kapon. Pezaj nigraj nuboj akumuliĝas. Streĉante la flugilojn, la unua pingveno solene diras :

- Dio paŝas kaj repaŝas malantaŭ tiuj nuboj ! Li gvatas nin !
- Stultaĵoj ! respondas la alia, Dio ne vidas nin, pro tiuj nigraj nuboj !



Samtempe, blanka kolombo, sufiĉe dika, hastas tra la aero. Ŝi plonĝas al la du pingvenoj kaj mallerte surneĝiĝas iom pli for. Ŝi plurfoje peze resaltas antaŭ ol sveni.
La du pingvenoj studas la fluglinion kun atento :
« Hodiaŭ oni ja ne enuas » ili pensas.
« Unue flava papilieto, kaj nun tiu dika kolombo ».
Vekiĝinte, la kolombo proksimiĝas al la du pingvenoj.

- Ĉu mi povas iom paroli al vi pri Dio ? ŝi demandas kaj tuj parolas plu.

Bone, fakte, mi alportas mesaĝon de li. Atente aŭskultu, Dio diris…
Sed kio fiŝe fetoras ĉi tie ?

- Estas ni, respondas la du alproksimiĝantaj pingvenoj.
- Do, Dio mia, iru for ! diras la kolombo kaj retiriĝas per unu paŝo.

  Dio ne plu eltenas homojn kaj bestojn. Ili senĉese kverelas, trifoje ĉion oni devas rediri al ili. Li senpacienciĝis. Dio ĉiopova diris…

La kolombo haltas momenton por prepari sian efekton antaŭ ol rekomenci per malalta voĉo :

- Li diris : « Mi venigos akvan diluvon sur la teron ! Multiĝos akvo de riveroj kaj lagoj ĝis kiam akvo estos alte super la tero. Kaj eĉ domoj estos okupitaj, kovriĝos ĉiuj altaj montoj ĝis la plej altaj pintoj, kaj je la fino, la tuta tero malaperos pro la diluvo. »[3]

Jen !

Post profunda spiro, la kolombo malgracie falas en la neĝon pro elĉerpiĝo.

- Nun, ŝi aldonas, ĉiuj bestoj de la tero scias. Restis nur vi du.

La du pingvenoj gape aŭskultis la kolombon.

- Venas la fino de la mondo !
- Jes prave, ĝuste tion volas Dio ! diras la kolombo.

Ŝi elpoŝigas botelon, malfermas ĝin, kaj senspire trinkas, antaŭ ol daŭrigi.

[3] Laŭ Genezo 6.17, 7.17, 7.19

- Dio volas pereigi ĉiujn karnojn kun la tero kaj rekomenci ekde la genezo[4]. Kaj vi ambaŭ, ŝi fulme rigardas ilin, vi vere fiŝe fetoras !
- Sed, kio okazos pri ĉiuj ekzistaĵoj ? demandas la pingvenoj per tremanta voĉo.

La kolombo ne respondas. Ŝi estas tro okupata pro la facile rompiĝema fermilo de sia boteleto. Ŝultrumante, ŝi fine diras :

- Vi baldaŭ vidos.
- Kion ?
- Nu…
- …Ili dronos ?
- Vi diris tion, respondas la kolombo per kolera voĉo al la du pingvenoj.
- Vi deziris kelkafojajn aperojn de Dio, diras la unua pingveno, li ne plu maltrafas nun. Tute klaras.
- Kaŭzo ne sufiĉa por venigi akvan diluvon ! respondas la alia pingveno antaŭ ol turni sin al la kolombo. Ĉu eblas paroli kun Dio ? li hezite demandas.

La mieno de la kolombo fariĝas pensema.

[4] Laŭ Genezo 6.13

- Mi ne konas lin persone, sed malfacilas diskuti kun li. Li estas obstina kiel azeno ! Ĉiuokaze, tro malfruas, jam ekpluvas !

Estas vere, la du pingvenoj rigardas la ĉielon. Grandaj pluveroj ekfalas sur iliajn kapojn.

- Pluvo ĉesu, mi petas, ĉesigu ĝin ! ĝemas la du pingvenoj levante siajn flugilojn al la ĉielo. Ni neniam plu kverelos, ni promesas ! Ni estos kvietaj kiel fiŝetoj !
- Ne ĝemu, diras la kolombo per severa voĉo. Pli bone, preparu viajn aferojn !
- Niajn aferojn ?
- Restas loko en la arkeo de Noa por du pingvenoj. Ĉu mi tion ne jam diris ? demandas la kolombo.

Neatendante la respondon, ŝi haste aldonas :

- Ni kunportu el ĉiu specio po du, virbeston kaj ĝian inon. Ni do havas du elefantojn, du putorojn, du erinacojn, du zebrojn, du kanguruojn, du procionojn, du serpentojn, du kapreolojn, du sciurojn, du ĝirafojn, du mustelojn, du leonojn, du hundojn, du krokodilojn, du anserojn, du kamelojn, du formikojn.

La du pingvenoj estas tute surprizitaj.

- Sed kial nur po du ?
- Mi koncedas ke la arkeo de Noa estas grandega ŝipo, diras senpacience la kolombo, tamen ne troigu. Konsekvence, ni kunportu nur po du specie.

Jen viaj biletoj. Ne perdu ilin ! Kaj ŝi donas po unu bileton al la pingvenoj.




# LA ARKEO FORIRAS JE LA OKA



- Sed estu singardemaj ! antaŭavertas la kolombo, la arkeo foriros je la oka. Malfruontoj mortu drone !

Sur la bileto videblas granda ferioŝipo kiu krozas sur senmakula blua maro. Ĉe la dorso, malgrandaj literoj jenas :




La pingvenoj ne aldonas komenton. Fakte, ili malbone scipovas legi…

Antaŭ ol forveturi, la kolombo laste rigardas la du pingvenojn :

- Strange, ŝajnas al mi ke mi forgesas ion, ion gravan. Gratante la kapon, ĝi murmuras :
- Ne gravas, tio revenos !

Kaj la dika kolombo ekflugas peze en la aeron kaj malproksimiĝas sub la pluvo.

La du pingvenoj febre ekpakas siajn aferojn. Sed ili ne sukcesas koncentriĝi. Unu pensas :
« Ni estis elektitaj inter ĉiuj pingvenoj ĉar ni estas la plej bonaj…ĉefe mi !



Ni ĉiam estis kvietaj kiel fiŝetoj…ĉefe mi ! Indas savi nin …ĉefe min ! Pro tio ni ricevis biletojn por la arkeo. Se ne, ni certe dronus, kiel….kiel… ».

Kaj nun li paŭzas. Dum tiu tempo, la alia pingveno pensas :
« neordinaraj bonŝanculoj ni estas ! Se hazarde ni ne renkontus tiun kolombon, ni dronus. Finfine, vivi estas danĝere. Se du aliaj pingvenoj ĉeestus anstataŭ ni ĉi tie, ni dronus, kiel…kiel… ».
Kaj nun li subite haltas. Terura bildo dancas antaŭ liaj okuloj.

- Kio okazos al nia pingveneto ? li demandas.

Nenia respondo. Ili rigardas la falantan pluvon. La akvo-nivelo jam multe kreskis.

- Frue aŭ malfrue, li finfine rimarkos ion, diras la unua pingveno.
- Kion ?
- Ke…
- Li dronos.
- Vi diris tion, respondas la unua pingveno rigardante lin per kolera mieno.
- Ĉu vi rigardos nian amikon droni sen helpi lin ?
- Ne, mi ne rigardos lin, ĉar mi estos for delonge, mi estos en la arkeo de Noa !
  Ne okulumu min tiel, ne mi havis la ideon pri la diluvo !

Li refermas sian valizon per ekpuŝo, antaŭ ol aldoni.

- Ĉu vi preparas vian valizon ?

La dua pingveno ekrigardas sian valizon, kaj pripensas kiuj aferoj estos plej necesaj en la arkeo.

- Ni kaŝu la pingveneton en la valizon kaj ni enŝipigu lin ŝtele.
- Vi frenezas ! Se oni malkovros tion, oni forpelos nin kaj neniu pingveno travivos la diluvon. Ni respondecas pri nia specio, ĉu vi ne komprenas tion ? !

Tio sufiĉas por raciigi la duan pingvenon. Kun rompita kor', li fermas sian valizon malplenan.

- Mi volas almenaŭ vidi lin lastan fojon, li flustras.
- Verdire, respondas la unua pingveno, eble li ne feliĉos vidi nin. Mi konas lin, li verŝajne estas plu ofendita.

Sed la pingveneto ne estas ofendita. Li tutsole parolas sub sia pluvombrelo :

- Kial mi diris ke mi povas vivi sen miaj amikoj ? Nun mi havas neniun kun kiu disputi. Mi devus reiri al ili, kaj diri al ili ke mi eraris.

Sed tio ne imageblas, evidente. Neniu pingveno facile konfesas pri sia eraro.

- Mi sendube estas kondamnita al tutsola vivo ĝis la fino ! li aldonas, rigardante siajn piedetojn, kiuj kovriĝas iom post iom de akvo.

Subite, li aŭdas du voĉojn bone konatajn

- Ni hazarde preterpasis en la ĉirkaŭaĵo, ni decidis viziteti vin.

La pingveneto levas la kapon. La du aliaj staras fronte al li. Ĉiu portas valizon.

- Ĉu vi forvojaĝas ?
- Kiel vi kaptis tian ideon ?

# LA ARKEO FORIRAS JE LA OKA

La du pingvenoj humile ridas kaj provas kaŝi siajn valizojn malantaŭ la dorso. Denove silento.

Ili simple rigardas la pingveneton per siaj rondaj okuloj, suspirante.

- Pluvas, diras la pingveneto.
- Ha ! respondas la du aliaj. Ni ne rimarkis. Kaj ili rigardas la ĉielon kies aperturoj malfermiĝis kaj multiĝas la akvo[5].

- Estas kvazaŭ tiu pluvo neniam plu ĉesus, diras la pingveneto.
- Tute ne, tute ne, respondas la du aliaj, rigardante siajn piedojn jam malaperintajn pro la akvo.

Poste, ili ne plu scias kion diri. Ili simple rigardas la pingveneton per siaj nigraj okuloj, kaj plu suspiras.




[5] Genezo 7.11

- Venu sub mian pluvombrelon aŭ vi malvarmiĝos.

La du pingvenoj restas senmovaj.

- Kiam tri pingvenoj staras sub la pluvo, afable diras la pingveneto, kaj unu el ili havas pluvombrelon, tute normalas ke li proponas sekan lokon al siaj amikoj !
- Estas afable, asertas la du aliaj rigardante lin per siaj malsekaj okuloj.
- Ĉu vi ploras ?
- Estas nur pluveroj ! diras la du aliaj, kiuj rapide rigardas aliloken, kaj plu suspiras.

Tiuj suspiroj kaj larmoj scivolemigas la pingveneton. Li ŝatus tion diri, sed ne havas tempon, ĉar subite la du aliaj kondutas eĉ pli strange.



## LA ARKEO FORIRAS JE LA OKA

Ili forte pugnefrapas lian kapon. Unue, li vidas milojn da steloj, poste li vidas nenion, ĉar li svenis. Pro tio, li ne sentas ke la du aliaj provas ŝovi lin en valizon.



Malgraŭ lia maldikeco, li eniras en la valizon de neniu el la du.

La du aliaj serĉas trian valizon, enŝovas lin,



fermas la kovrilon, premas ambaŭ fermilojn (unu iom blokiĝas).



Tio perdigas amason da tempo al ili.

Kiam ili finfine alvenas al la arkeo kun sia kofro, nokto profundas delonge.



# LA ARKEO FORIRAS JE LA OKA

Pluvas kiel pisantaj bovinoj. Ĉe la enirejo de la arkeo, la kolombo kriegas per raŭka voĉo :

- Lasta alvoko ! La du lastaj pingvenoj devas urĝe aperi ĉe la arkeo de Noa ! Lasta alvoko !

Ŝi fine vidas la du pingvenojn. Ili nun havas akvon ĝis la genuoj kaj portas pezan valizon sur la kapo. Ŝi atentigas ilin :

- Kien vi malaperis ? ! Lastaj vi estas ! Ĉiuj aliaj bestoj enŝipiĝis antaŭ longe. Eĉ la du testudoj estis pli rapidaj ol vi ! Noa volis lasi vin ! Mi diris ke la arkeo foriros je la oka !
- Ha ! diras la du pingvenoj dum ili ŝovas sian valizon sur la ponteton. Ni komprenis la dekan.

La kolombo okulumas la valizon.

- Mi esperas ke vi ne intencas kunporti tiun valizon. Nur mansakoj estas permesataj.
- Sed ni ne povas rezigni pri tiu valizo !

- Kial ?

La du pingvenoj iom hezitas.

- Kion vi enmetis en tiun grandegan valizon ? demandas la kolombo.
- Venton.
- Kial ĝi estas tiom peza ?
- Nu, ĉar…ĝemas la du pingvenoj pro la pezo de la valizo, estas ventego.

Noa donis striktajn instrukciojn al la kolombo : ŝi devas malfermi ĉiujn suspektindajn pakaĵojn. Ŝi klinas sin super la valizon kun malfida mieno kaj flaras :

- Tiu valizo fiŝe fetoras ! ŝi ekdiras.
  Ĉu vi ne provas kaŝe enkonduki fiŝan sandviĉon ?
- Estas ni ! respondas la du pingvenoj. Ni ĉiam fiŝe fetoras.
- Nenian manĝaĵon aŭ trinkaĵon krom aĉetita surŝipe oni rajtas uzi. La budo de la arkeo provizos vin per ĉio kion vi bezonas. Malfermu tiun valizon !
- Tiu valizo estas absolute sendanĝera…

- Mi ne kredas ajnan damnitan vorton vian ! diras la kolombo kun senmova rigardo al la valizo.
- Ni estas pingvenoj… diras la pingvenoj per hipokrita rideto, oni povas fidi nin.
- Same kiel diris la sonserpentoj, mokas la kolombo, kaj kion mi trovis en ties mansako ? Kartludon.
- Ho, kia skandalo ! honeste surpriziĝas la pingvenoj.
- Ĉia hazardludo estas strikte malpermesata en la arkeo de Noa, komentas la kolombo.

La unua pingveno ĵuras ke la valizo enhavas nenian kartludon, almenaŭ tiun fojon li diras la veron. Kvankam la dua volas scii kiel serpentoj sukcesas kartludi, la kolombo dekretas ke ŝi havas nenian emon plu diskuti, ke ŝi malfermos tiun valizon kaj se ŝi trovos ion ajn krom ventego, la du pingvenoj povos forgesi pri sia loko, kun la malĝojiga rezulto ke ili dronos, kaj ekde tiam ne plu vivos pingvenoj, kaj ke ŝi fajfegas pri tiu ĉi lasta detalo.

Post okula interkonsento, la du pingvenoj profunde spiras kaj balbutas :

- Do, en tiu valizo, estas…ni ne kuraĝis…sed estas nur malgranda…

Ĝuste tiam, blindiga fulmo ŝiras la ĉielon, sekvata de tondrego kies eĥo ĉirkaŭas la tutan teron.

La ŝtormo disfendas ĉiujn fontojn de la abismoj, faligante lavangon de akvo sur iliajn birdajn kapojn.[6]


- La Diluvo ! kriegas la kolombo per ŝira voĉo. Venas la Diluvo ! Kial do vi vagas ĉi tie, prenu tiun valizon kaj enŝipiĝu, mi devas fermi la pordon !

Kaj la du pingvenoj suprenpuŝas sian valizon en la arkeon anhelante.
La kolombo ekrigardas lastan fojon la teron tute kovriĝontan de akvo.

---

[6] Genezo 7.11


LA ARKEO FORIRAS JE LA OKA




- Strange, ŝajnas al mi ke mi forgesas ion, ion gravan. Gratante al si la kapon, ŝi murmuras :
- Ne gravas, tio revenos !

Kaj ŝi haste fermas la pordon.

Se vi jam promenis en la arkeo de Noa, vi scias ke ĝi estas grandega ŝipo. Tiel granda kun malsupra spaco, dua spaco kaj tria spaco, ke oni tre facile perdiĝas.[7] Noa tre fieras pri sia arkeo. Li pretendas ke la Eternulo donis al li kelkajn trukojn. Ekzemple, laŭ Noa, Dio konsilis uzi goferan[8] lignon kaj ŝmiri la arkeon per peĉo interne kaj ekstere[9].
Sed la du pingvenoj ne havas okazon aprezi la talentojn de Noa. Ili senspire trenas sian pezan valizon sekvante la kolombon.



[7] Genezo 6.16
[8] Nekonata ligno el kiu Noa faris la arkeon (PIV)
[9] Genezo 6.14



Enŝoviĝante en senfinajn koridorojn, ŝi transpaŝigas al ili tubojn, malsupreniriigas amason da krutaj ŝtuparoj, ĝis ili tute perdas la orientiĝon. Kiam iu ĝemas pro laceco, la kolombo turnas la kapon al li, kaj furioze flustras :

- Silentu. La aliaj bestoj delonge dormas.

Ĉe la fino de longa koridoro, ŝi malfermas pordon kaj malaperas en ĉambro karbonigra. La du pingvenoj stumblas je sia valizo.


- Kie ni estas ?
- Ĉe la fundo, murmuras la kolombo, en la ventro de la arkeo !

La du pingvenoj surplankigas sian valizon kaj ĉirkaŭrigardas. Estas fulge nigre, escepte pro elektra ampolo ĉe la plafono, kies malfortaj radioj lumigas kelkajn barelojn.

Klakas kaj krakas ĉie en la kelo.

- Kio estas tiu stranga odoro ?
- Peĉo, respondas la kolombo montrante la barelojn. Noa ŝmiris la arkeon per peĉo por malebligi likojn, mi ĵus diris tion al vi.
- Peĉo ? ekkrias la du skandalitaj pingvenoj.
- Silentu ! Vi vekus la aliajn bestojn, diras la kolombo rigardante la plafonon per zorgoplena mieno. Leonoj malprofunde dormas.
- Tiu fetoro ne estas eltenebla.
- Peĉa odoro akordiĝos tre bone kun via fiŝa fetoro, diras la kolombo per unutona voĉo, ŝajnigante ke ŝi eliros.

  Aliaj demandoj ?



Evidente la pingvenoj havas aliajn demandojn ! Amason ! Unue, ili volas scii je la kioma la bufedo malfermiĝos, ĉu oni devas elegante vesti sin por la manĝoj, ĉu estas naĝejo sur la ferdeko, ĉu oni proponas sportajn aranĝojn kaj…

- Kie vi kredas esti ? furiozas la kolombo subite ne blanka sed ruĝa.
  Ĉi tio estas savboato, ne luksa krozoŝipo !

Tuj poste aŭdiĝas profunda bleko. La du pingvenoj ektremas. La kolombo atakeme okulumas.

- Aŭdu ! vi vekis la leonojn. Konsciiĝu, ne estas facile por kolombo endormigi leonparon. Nu, mi lasu vin nun, sed mi ne plu volas aŭdi eĉ korbaton !
- Momenton, diras la pingvenoj ofendite. Ni devos resti enkarcerigitaj ĉi tie, ĉu ?
- Bonŝance vi havas lokon ! respondas la kolombo, pleje incitita.

La arkeo estas plenigita de bestoj ĝissupre. Estas vere ke tute nigras, vi ne havas aeron sed almenaŭ vi havas lokon. Supre, ili kuŝas unu sur la alia.

- Sed kion ni faros ĉi tie dum tiu longa tempo ?
- Dormu, kiel la aliaj.
- Kiam oni alvenos ?
- Ni eĉ ne ankoraŭ foriris, kriegas la kolombo, kaj vi jam volas scii kiam vi alvenos ?

Tuj poste aŭdiĝas terura elefantobleko. La du pingvenoj ektremas. La kolombo lamentas :

- Gratulon ! Jen vi vekis la elefanton !
  Denove vi…

Fortega skuo interrompas ŝin. La hulo[10] de la arkeo ekmoviĝas. La kolombo falas sur la pingvenojn, la valizo glitas sur la planko, la pingvenoj alkroĉiĝas unu al la alia kun tremoj. Teruregaj krioj elvenas el ĉiuj lokoj. Ŝafoj beas, kaproj mekas, ĉevaloj henas plej multe, hundoj bojas, ursoj graŭlas, porkoj gruntas kaj hipopotamoj graŭle koncertas, elefantoj trumpetas, kokoj kokerikas,

[10] La ĉefa strukturo kaj floskorpo de ŝipo


kokinoj klukas kaj anseroj gakas, katoj miaŭas, lupoj hurlas kun la strigoj kiuj ululas, serpentoj siblas, ranoj kvakas, boacoj silentas en ĉiuj lingvoj kaj bovinoj muĝas freneze…Do, oni ne plu interkompreniĝas.

Kaj, subite iĝas silente. Oni perceptas nur flustron stabilan. La hulo ŝanceliĝas, la elektra ampolo malrapide pendolas.

- Ekis la vojaĝo, konstatas la kolombo. La arkeo de Noa flosas, bonan vojaĝon !

Alveninte ĉe la sojlo, ŝi turnas sin por rigardi la du pingvenojn kiuj alkroĉiĝas unu al la alia kun tremoj.

- Strange, ŝajnas al mi ke mi forgesas ion, ion gravan. Gratante la kapon, ŝi murmuras :
- Ne gravas, tio revenos !



Kaj ĝi fermas la pordon malantaŭ si.

Tuj post ŝia foriro, la du pingvenoj malfermas la valizon.

- Mi esperas ke li ne mortis pro sufokiĝo !

La pingveneto estas faldita en la valizo kiel akordeono. La du aliaj pingvenoj puŝas lin per siaj flugiloj. Li restas senmova.

Do ili enŝovas siajn kapojn en la valizon kaj flaras. La pingveneto strange odoras. Unuavide, li aspektas mortinta, sed kiam li aŭdas unu el ili diri :
« Li tre verŝajne foriris al la paradizo », li eksaltas el la valizo kiel streĉita risorto, rigardas ĉirkaŭ si kaj demandas, tute ekscitite :

- Kie mi estas ?
- En la arkeo de Noa
- Kio odoras tiel ĉi tie ?
- Peĉo, sed oni alkutimiĝas.

- Mi tute ne ŝatas tion, diras la pingveneto, mi hejmeniru !

Plej zorgeme, la du aliaj klarigas ke lia domo ne plu ekzistas kaj ke akvo kovris ĉion pro la Diluvo, kiun Dio venigis.
La pingveneto plorsingultas.

- Ĉu tio signifas ke Dio vere ekzistas ?
- Honeste, li amplekse pruvis sian ekziston, asertas la du aliaj.
  Ne troigu, devus ĉeesti nur du pingvenoj sur la arkeo, sed ni ŝtele enŝipigis vin. Neniu rajtas scii, ĉu vi komprenas ?
- Kaj la aliaj bestoj ? Kio okazos pri ili ? demandas la pingveneto.

Sed la du aliaj ne respondas. Ili rigardas siajn piedojn tro penseme. Ŝultrumante, ili finfine diras :

- Frue aŭ malfrue, ili finfine rimarkos ion.
- Kion ?
- Nu…
- Ili dronos !
- Tion diris vi, respondas la du pingvenoj ĵetante koleran rigardon al la pingveneto.

- Ĉu tio signifas ke Dio pereigos ĉiujn bestojn per drono ?


La du pingvenoj provas klarigi al li ke Dio malfeliĉiĝis, ke li ne plu eltenis senĉesan kverelojn, kaj pro tio li volis rekomenci ĉion ekde la genezo, sed fakte ankaŭ ili ne tre bone komprenis.

- Mi ja komprenas ! ekkrias la pingveneto.

Li foriras en la plej malproksiman angulon de la ĉambro kaj laŭte ekploras.

- Pri ĉio ĉi kulpas mi. Mi diris ke Dio ne ekzistas, kaj pro tio li venigis la Diluvon !
- Sed li eĉ ne aŭdis vin !
- Jes ja, diras la pingveneto ploretante. Dio havas grandajn orelojn, mi estas malbona pingveno, pri tio mi ĉiam fanfaronis, des pli, aldonas li mallaŭtigante la voĉon, ke mi dispremis iun !
- Kiun ?
- La papilion.
- Ho tiun ĉi, antaŭ longe ni forgesis ĝin !

- Eble vi, sed ne Dio ! diras la ploranta pingveneto. Ĉar li havas komputilan memoron.
- Dio certe vidis nenion, diras la du aliaj. Li estis tiom multe okupata pro la preparo de la Diluvo. Li estis rompanta al si la kapon, eĉ por dio, diluvo ne estas bagatelaĵo. Des pli, ke vi ne intence sidiĝis sur la papilion, tio okazis pro malatento !
- Pri tio mi ne plu tiel certas, konfesas la pingveneto. Mi deziris sidiĝi kaj mi pensis : « ĉeestis tamen io flava tie ĉi !» kaj mi sidiĝis kaj pensis « ĉu ne estis la papilio ? », kaj mi pensis : « mi fajfas, mi sidiĝu spite al ĉio. Kaj se temas pri la papilio, nu, kulpas ĝia fato ! »



La pingveneto ploras kiel eble plej multe. Lia tuta korpo skuiĝas. La du aliaj sekigas liajn larmojn, trankviligante lin :

- Ĉiuokaze, tiu papilio neniel mortis. Ĝi tuj malsvenis, se vi ne foririntus, vi vidus ĝin leviĝi kaj ekflugi. Ĝia maldekstra flugilo restis iom ĉifita, li iom malprecize flugis kaj…



Tio neniel rilatas al la vero, ĉar neniu zorgis pri la sorto de la papilio, sed oni devas urĝe kvietigi la pingveneton. Oni verŝajne aŭdas liajn plorojn je ĉiu etaĝo.

- Ha, vi tion diras por konsoli min ! diras la pingveneto

Li surventriĝas kaj martelas la hulon de la ŝipo per siaj flugiletoj.

- Mi mortigis papilion ! Pro mia peko, malbenita estas la tuta mondo.

Kaj li plenforte krias :

- Mi kredas je vi, Eternulo ! Sed kial vi punas ĉiujn aliajn ? Nur unu pingveno ofendis vin, kaj vi venĝas vin kontraŭ la tuta mondo ! Ĉu vi nomas tion justeco ? Mi furioziĝas, mi eĉ ege ege furioziĝas ! Ĉu vi aŭdas min, Dio, ĉu vi aŭdas min ?

Ĉiel, almenaŭ la kolombo aŭdis lin. Ŝi hastas al la kelo fulmrapide. La unua pingveno tuj plonĝas en la valizon kaj ekfermas la kovrilon, samtempe kiam la kolombo impetegas en la pordon.



- Ĉu vi ne povas konduti normale ? kriegas la kolombo. Oni aŭdas vin ĝis la supera spaco ! Normale, vi devus nun dormi !

Se ŝi pli bone observus, ŝi vidus ke la unua pingveno estas iom pli granda ol la alia.

- Mi havas ĝis super la oreloj ! plendas la kolombo. Pro nekonataj kialoj, la du antilopoj rifuzas dormi apud la leonoj !
  La du pegoj senĉese bekas en la hulon ! Formiko perdis sian kunulon kaj serĉas ĝin en fojnamaso…Kaj Noa neniel helpas. Tio fareblas, tio farindas, tio farendas. Senĉese li ordonas, senkompate li plendas.

La kolombo ĉesas. Ŝi zorge rigardas la pingvenon.
- Sed ĉi tiu pingveno ŝanĝiĝis post la lasta fojo, ŝi penseme diras.

La pingveneto tiom timas ke li mutas, sed la alia hastege diras :
- Ĉiuj pingvenoj estas similaj inter si.
- Ankaŭ mi pensis tion, diras la kolombo rigardante unu post la alia. Sed tiu ĉi malgrandiĝis.
- Pingveno iomete ŝrumpas…
- Ĉu vere ? diras la kolombo, atente rigardante la pingveneton.
  Kial li nenion diras ?

La pingveneto malraŭkigas sian voĉon kaj respondas :

- Mi malsatas.
- Ŝajnas ke ankaŭ lia voĉo ŝanĝiĝis.
- Pro malsato, samtempe diras ambaŭ pingvenoj per tremanta voĉo.

La kolombo profunde ĝemas, ruladas la okulojn kaj malvolonte proponas paketon da sekaj kukoj al la pingvenoj.

- Prenu, tio estas mia pikniko !

Fermu viajn bekojn. Nenian manĝaĵon aŭ trinkaĵon ne aĉetitan surŝipe oni rajtas uzi, sed spite al ĉio, ankaŭ la aliaj bestoj malobeas la regularon. La kanguruoj eĉ kunportis sian skatolon por ŝmirpano !

La du pingvenoj haste frandas la sekajn kukojn. Jam bedaŭrante sian bonkorecon, la kolombo aldonas per kolera voĉo :

- Sed ne allasu biskviterojn ĉien ! Kaj konservu iom por poste. Neniu scias kiom longe daŭros la vojaĝo.

Alveninte al la sojlo, ŝi turnas sin por rigardi la du pingvenojn, kiuj maĉadas siajn sekajn kukojn.

- Strange, ŝajnas al mi ke mi forgesas ion, ion gravan. Gratante la kapon, ŝi murmuras :
  ne gravas, tio revenos !

Kaj ŝi rapide fermas la pordon malantaŭ si.


Tuj poste, la tria pingveno eliras el la valizo kaj avide etendas siajn flugilojn al la sekaj kukoj.

Dum longa tempo, oni plu aŭdas nur la pingvenojn, kiuj krakmaĉas sian vespermanĝon en la kelo. En la ventro de la arkeo, nek noktiĝas nek tagiĝas. Plu pendolas la elektra ampolo, plu fetoras peĉe.

- Ha, plendas la pingveneto, kiel multe mi ŝatus esti droninta ĉe la fundo de la maro !

Ŝajnas al li ke la vojaĝo eterne daŭras. La sekaj kukoj estas formanĝitaj delonge.

LA ARKEO FORIRAS JE LA OKA



Kuŝante surdorse, la pingvenoj aŭskultas la plaŭdadon de la pluvo kaj la glugluadon de siaj stomakoj.

- Ha, plu ĝemas la pingveneto, kiom multe mi ŝatus esti droninta ĉe la fundo de la maro !
- Se vi plian fojon diros tion, ni forĵetos vin el la ŝipo, respondas la du pingvenoj.
- Estus pli bone tiel, ĝemas la pingveneto. Mi fine dronus ĉe la fundo de la maro !

Li rigardas siajn amikojn, pensante :

« ili verŝajne pentas pro mia ŝtela enŝipiĝo. Ĉiam, unu el ni devas kaŝi sin en tiu valizo.


Iam la kolombo ekscios pri ĝi. Miaj amikoj devintus lasi min droni. Tiu solvo estus la plej simpla por ĉiuj ».

Intertempe, la du aliaj pensas : « ni neniel devintus mensogi. Ni devintus diri al la kolombo :
Ni estas tri amikoj kaj ni neniam forlasos unu el ni ! Pingvenoj ĉiam triopas, kaj se Dio ne ŝatas, li forgesu pingvenojn ! ».

- Ĉu vi plu memoras kiel ni vivis hejme ? subite demandas la pingveneto, rompante la silenton.

Ili triope intense pripensas. Antaŭ tiom multe da tempo, ili vivis en lando kiu ĉiam senŝanĝe blankis. Malĝoje ili memoras neĝon. Glacio brilis diamante. Dum tiu epoko, ili ĉiam sciis kio okazos. Alidire, nenio okazos. Estis tiom trankvilige. Ĉu ili neniam denove spertos bankizon ?
Per raŭka voĉo, la pingveneto ekkantas :

# LA ARKEO FORIRAS JE LA OKA



*Kiam forgesinte ĉion*
*Sufiĉas fermi la okulojn*
*Tiam vidinte la bankizon*
*Sufiĉas senti la ĝojojn*
*Ĉe ni, ĉe ni, ĉe ni*

Li kantas pli kaj pli laŭte.
- Ĉe ni, distrumpetas la pingvenoj. Ĉe ni !

Kaj ili ekdancas, ripetante « ĉe ni » !

Se vi jam rigardis pingvenojn dum tiaj cirkonstancoj, vi ja scias ke ili svingiĝas, saltetas, flugetas ĉien. Ili tiel freneziĝas ke ili falas unu sur la alian. Ili forgesas la ĉirkaŭaĵon pro ĝojo.

Ili neniel suspektas ke la kolombo proksimiĝas.

- Kial okazas kokineja tumulto ĉi tie ? kriegas la kolombo, puŝante la pordon. Mi unuafoje ĵus enlitiĝis.

La kolombo havas dormoĉapon kaj tiel laŭte krias ke ŝi ruĝiĝis kiel tomato. Se ŝi rigardintus ĉirkaŭ si antaŭ ol kriaĉi, ŝi certe kalkulus ne du sed tri pingvenojn. Tamen, unu balbultas :

- Ni iomete festas por honori nian hejmon.
- De dek kvin tagoj mi senĉese kuras de unu loko al alia ! eksplodas la kolombo.

  Pro malsano, la ĝirafo havas ĉiam sian kapon tra la balustrado. La pavo estas tiel ekscitita ke ĝi senĉese paradas. Restas neniom da spaco.

> Kaj Noa neniel helpas. Antaŭ du semajnoj, li riglis sian kajuton kaj rifuzis eliri ! La kretena kolombo respondecas pri ĉio, sed ĉu vi kredas ke li iam dankis ? Neniam !

Kaj ŝi tondre fermas la pordon malantaŭ si.

La tri pingvenoj reviviĝas.

- Uf ! Ŝi ne rimarkis la trian.
- Ŝi bezonas okulvitrojn, ridaĉas la pingveneto. Sed li subite ekhaltas pro aŭdo de la kolombaj paŝoj.
- Atentu, ŝi revenas.

Li ekplonĝas en la valizon kaj ekfermas la kovrilon, kvazaŭ rimarkite de la kolombo.
Ŝi staras ĉe la sojlo kun la flugiloj sur la koksoj, kaj ŝi traserĉas ĉirkaŭ si.

- Ĉu ne estis tri pingvenoj ĉi tie ?
- De kie venus la tria pingveno ? demandas la du aliaj per anĝela voĉeto.

- Tamen, ŝajnis al mi, ke mi vidis trian pingvenon, diras la kolombo, inspektante la kelon.
- Sed estas tute normale argumentas la du aliaj. Kiam oni kuras senĉese de unu loko al alia dum dek kvin tagoj, kiam oni respondecas pri ĉio sola, ne ricevinte eĉ unu dankon, kiam Noa neniel helpas, kiam oni povis ripozi ne unu sekundon, okazas ke oni vidas trian pingvenon !

De longa tempo, la kolombo ne aŭdis tiom da afablaj paroloj. La aliaj bestoj ĉiam plendas.

- Nur vi komprenas min, ŝi diras kun okuloj larmoplenaj. Vi ne povas imagi kiel mi fartas, tiu pluvo neniam ĉesos, mi senesperiĝas, tiu arkeo estas ideo tute freneza, mi kredis pri vojaĝo al feliĉo, sed, Dio mia, ŝajnas ke ni flosos dum la tuta eterneco en ĉi tiu peza ŝipaĉo, kaj ni neniam alvenos ien ajn. Estus preferinde morti drone…

La kolombo klinas la kapon, kovras la okulojn per la flugiloj, kaj mute ekplorĝemas. La du pingvenoj cerbumas kiel forĵeti ŝin plej rapide sen ofendi ŝin. Ili anaspaŝas ĝis la pordo, malfermas ĝin plene kaj krias :

- Ĝis revido !

Sed la kolombo daŭre mute plorĝemas.

Subite, voĉo aŭdeblas tra la silento. Rekte el la valizo :

- Ĉu vi ne povintus forpeli tiun furiozan kolombon pli frue ? Mi sufokiĝas ĉi tie !



- Kio estas tio ? demandas la kolombo.

La du pingvenoj agas kvazaŭ ili strebus aŭdi.

- Ni aŭdas nenion.
- Tio venis el la valizo, konstatas la kolombo.

La du aliaj kapneas.


- Ekde la komenco, tiu valizo estis suspekta por mi, diras la kolombo direktante siajn flugilojn al la valizo ! Malfermu.

La du pingvenoj ŝtoniĝas.

- Mi volas scii kio kaŝiĝas en tiu valizo ! insistas la kolombo.
- Dio, diras la pingveneto per kaverna voĉo.
- Kion vi diris ! diras la kolombo.

Oni aŭdas raspon de gorĝo en la valizo. Kiam la pingveneto denove parolas, lia voĉo iom pli malakutas.

- Vi perfekte aŭdis.
- Mi ne kredas vin ! ridas la kolombo.



- Vi ne kredas je Dio ! diras la voĉo minace.
- Jes ja, sed…
- Ha, vidu, viglege diras la valizo.
- Jes, mi malfacile kredas ke Dio kaŝiĝas en tiu valizo, diras la kolombo.
- Kial ? Dio estas ĉie !

La kolombo mute demandas al la pingvenoj per siaj okuloj. Ili kapjesas.

- Pruvu al mi ke vi estas Dio ! diras la kolombo.
- Pruvon vi ne bezonas por kredi je mi !
- Vi postulas multon…
- Mi scias, sed ĝuste tia estas la afero, diras la valizo. La malo estus tro facila. Ne senkiale oni diras « kredi je Dio »…

La kolombo pensas dum momento, kaj fine demandas :

- Ĉu vi scias kion mi kredas ?

Kaj sen atendi respondon, ŝi daŭrigas.

- Tio estas ŝerco. Mi malfermos tiun valizon, tutsimple, kaj mi vidos.
- Kiel vi deziras, diras la voĉo, sed vi fariĝos blinda.
- Blinda ?
- Tiu kiu vidas Dion blindiĝas. Se vi nepre volas blindiĝi, malfermu tiun valizon. Sed atentu, la maldekstra fermilo rajpas[11].

La kolombo rigardas la du pingvenojn per perpleksa mieno. La unua demandas sin ĉu veras ke vidi Dion blindigas, dum la alia honeste esperas ke se Dio vere havas okulojn ĉie, li tamen ne estas spektanta la okazantaĵojn en la arkea ventro. Post momento, la voĉo rekomencas.

- Vi hezitas ! vi estas tre saĝa.

Cetere, estus ege domaĝe se tiel bela kolombo perdus la vidopovon.

[11] Rajpi : alfiksiĝi, kvazaŭ gluita pro manko de lubrikaĵo.

- Kiel vi scias ke mi estas bela kolombo ?
- Vidu ! Mi kreis vin…
  Kreante ĉiujn karnojn de la tero, mi pensis : « *por la fino, mi kreu estaĵon pleje superan al ĉiuj aliaj, estaĵon kvazaŭ dian* ». Tiel mi kreis la unuan kolombon.

La kolombo flugetas surloke, tute ekscitite.


- Dio mia ! Dio vere estas en tiu valizo !

Genuiĝante antaŭ la valizo, ŝi ekdiras :

- Mi bedaŭras pro mia dubo pri vi !
- Jam forgesite.
- Neniam mi imagis vin tiel komprenema…
- Bedaŭrinde, multas tiuj, kiuj false imagas pri mi.

La kolombo proksimiĝas surgenue al la valizo.

- Honeste, mi iom riproĉis al vi.
- Forgesite. Estis elteneble.



> Des pli ke estas malfacile koleri kontraŭ iu, pri kiu vi fajfas. Se vi rankoris, tio signifas ke mi havas profundan signifon por vi…

La kolombo mutas. La du pingvenoj miras. Kiel li imagas tian fabelon ?

- Ĉu vi povas diri al mi kial vi tiom rankoris ?

La voĉo ŝajnas amika, sed la kolombo suspektas ke ŝia respondon gravas rilate al ŝia fato. Ĉu kaptilo ?
Ŝi rapide pripensas, kaj decidas riski.

- Tiu diluvo estas katastrofo !
- Verdire, senpasie ellasas la valizo, mi ne tro fieras pri ĝi. Fakte…
- Daŭrigu, atente diras la kolombo.
- Nu, pri la uzo de mia povo, mi iomete malsobris.
- Iomete malsobris ?

Eĉ la du pingvenoj konsterniĝas.

- Mi eraris, grumblas la valizo.

La du pingvenoj vide interkonsentas kaj ambaŭ prenas la kolombon je la flugiloj, kaj kondukas ŝin al la pordo.



- Dio estas iom laca…
- Lasu min ! diras la kolombo. Estas tiel mirinde. Neniel mi pensis ke estus tiel agrable babili rekte kun Dio !



- Vi povas resperti tiun plezuron kiam ajn vi deziras. Laŭ spirito, mi estas kun vi ĉiujn tagojn[12].
- Mi havas fidon kaj ne plu dubos[13] ! Mi ĉien laŭtigos vian gloron ĝis fina venko, kaj mi asertas, levante la dekstran flugilon, ke antaŭ nelonge, ĉiuj bestoj de la arkeo amos vin tiom, kiom mi amas vin !
- Ha, forgesu ! diras la valizo. Ĉiu decidu per si mem ĉu li amas min aŭ ne. Amo valoras nur libervole…

---


[12] Mateo 28.20. Paŭlo 2.5
[13] Mateo 21.21

La kolombo pleje emociiĝas. Ŝi saltas sur la valizon kaj brakumas ĝin.

- Mi ĉiam amis vin ! Sed nun eĉ pli intense ol antaŭe. Vi valoras eĉ pli ol kiom mi pensis !

Kiam la kolombo komencas kisi la valizon, tiu fervoro ĝenas la du pingvenojn.

- Sed ĉu vi eble deziras ion ?
- Diru vorton al mi, mi plenumos vian tutan deziron[14].
- Mi volonte frandus pecon da fromaĝtorto.



- Kion ? diras la kolombo iom ŝokite.
- Pecon da fromaĝtorto.

Nun, ili triope rigardas la valizon. Prema silento daŭras, ĝis la du pingvenoj prudente diras :

- Estas finite por hodiaŭ. Ŝajnas al ni ke Dio estas iom streĉita. Tiu Diluvo tute elĉerpis lin.

---

[14] Reĝoj 5.8

- Li des pli meritas sian fromaĝtorton, diras la kolombo.
- Tiu kolombo iros al paradizo ! ĝoje ekdiras la valizo.
- Sed ĉu vi ne ŝatas ion pli ampleksan post ĉiuj tiuj zorgoj ? demandas la kolombo per dolĉa voĉo.
- Fromaĝtorto plene sufiĉos.
- Kun krusteca supera tavolo ? diras la kolombo per miela voĉo.

Nova ĝoja krio aŭdiĝas en la valizo.

- Kaj multe da sekvinberoj ?
- Fakte, neniom, se eblas.
- Kaj kelkaj amuzaj ornamaĵoj ? flustras la kolombo.
- Mi neniam forgesos vin ! ĝojegas la pingveneto.


Li tiel raviĝas ke li fermas la okulojn kaj streĉas siajn pugnetojn. Tiel, li daŭre parolas, ne rimarkante ke la kolombo zorgeme malfermas la valizon.

- Ĉar mi havas komputilan memoron, mi tre serioze pensas fari vin speco de ambasadoro…

Sed li subite konsciiĝas ke lia voĉo ne plu eĥas en la valizo. Li ekmalfermas la okulojn. La kolombo fulme rigardas lin kaj strikte krucas siajn flugilojn sur la brusto.

- Eĉ se mi ne persone konas Dion, mi certas pri unu afero, tio ne estas Dio !
- Kiu vere certas, demandas la pingveneto per duboplena voĉo.
- Dio ne estas pingvena ! hurlas la kolombo al lia vizaĝo.

La du aliaj pingvenoj vane provas persvadi ŝin ke Dio povas enkorpiĝi en iu ajn karno, ŝi ne plu aŭskultas.




Ŝi freneze ien kaj tien traflugas la kelon perdante kelkajn plumojn. Ŝi deklaras ke neniel ŝi kredis tiun maskeradon, kaj ke la pingveno devus honti, kaj ke ŝi bedaŭrinde devas raporti la tutan veron al Noa, kaj sendube la puno estos teruriga !

Alveninte ĉe la pordo, ŝi turnas sin lastan fojon :

- Vi meritas skoldegon !

Kaj ŝi kviete fermas la pordon malantaŭ si.

- Sed kial fromaĝtorto ! ekdemandas la du aliaj pingvenoj.
- Nur pri tio mi pensis, respondas la pingveneto, tute konfuzita.
- Nur tiam la kolombo komprenis ke vi ne estas Dio.
- Mi, mi komprenis iom antaŭe, aldonas la dua.



- Komprenis kion ?
- Ke vi ne estas Dio.
- Ĉu vi vere kredis ke Dio kuŝis en tiu valizo ? demandas la pingveneto surprizite.
- Dum momento, jes. Vi estis brile konvinka.

La pingveneto ruĝiĝas pro fiero.

- Mi eĉ ne pripensis la eldiraĵojn : vortoj tutsimple fluis el mia beko.

Sed la tria pingveno subite koleriĝas.

- Ĉu vi perdis la kapon ?
  Neniel Dio konsentus pri eraro dia ! Vi ŝajnigis esti Dio, estas…estas… ekzistas vorto por tio, sed mi ne konas ĝin, li diras per mallaŭta voĉo. Aŭ tiu vorto ankoraŭ ne ekzistas, ĉar neniu aŭdacis tiel peki. Terura puno alvenos por ni pro vi.

Mi jam vidas la punon de la Eternulo trafi nin…

- Eble Dio estas malsimila ol kion ni pensas, flustras la du aliaj. Ĉu oni ne certas ke li faros venĝon[15] ?

Sed ili ne vere kredas je tio. Ili klinas la kapojn kaj atendas tiun skoldegon. La pingvenoj cerbumas : kian punon pripensos Dio ? Ili tute ne scias, kion entenas skoldego, sed ili tamen timas. Baldaŭ ili ne plu scias ĉu ili atendas sian punon de unu minuto, unu tago aŭ unu semajno. Ŝajnas ke eterno pasis.

- Tiu puno verŝajne neniam trafos nin, grumblas la pingvenoj. Atendi punon estas eble la puno ?...

Subite, fortega skuo okazas. La hulo de la ŝipo krakas. Pingvenoj falas unu sur la alian.

[15] Miĥa 5.15



Krioj elvenas el ĉiuj lokoj. Ŝafoj beas, kaproj mekas, ĉevaloj henas plej multe, hundoj bojas, ursoj graŭlas, porkoj gruntas kaj hipopotamoj graŭle koncertas, elefantoj trumpetas, kokoj kokerikas, kokinoj klukas kaj anseroj gakas, katoj miaŭas, lupoj hurlas kun la strigoj kiuj ululas, serpentoj siblas, ranoj kvakas, boacoj silentas en ĉiuj lingvoj kaj bovinoj freneze muĝas…
Do, oni ne plu interkompreniĝas.
Samtempe, piedfrapoj kaj stamfado martelas la plankon. Sed iom post iom, blekoj mallaŭtiĝas kaj piedfrapoj kaj stamfado ĉesas. Fine, la pingvenoj ne plu aŭdas ion ajn. Ili aŭskultas per streĉitaj oreloj. Oni ne aŭdas eĉ plaŭdon de akvo.

Kaj la elektra ampolo nun pendas perfekte senmova.


- Mi ne scias kial, diras pingveno tra la silento, sed mi subite emas frandi fromaĝtorton.

Kaj tuje, la pordo malfermiĝas.

La kolombo aperas ĉe la sojlo. Ŝi tenas ion per sia beko.

- Sta de ŝi rita fo li rabo, ŝi diras.
- Kion ?
- E st deŝi foli rabot, ŝi rediras, sed pingvenoj plu ne komprenas.
- Estas deŝirita folio de olivarbo[16], stultuloj ! Ŝi rekomencas post ellaso de kion ŝi havis en la buŝo. Ne plu pluvas, kaj Noa diris : «  elflugu kaj kontrolu ĉu la akvo malfortiĝas ie sur la tero[17] », kaj mi finfine trovis ĉi tiun peceton de olivarbo. La Diluvo estas finita. La akvo malfortiĝas, forsekiĝis la tero. Kion vi atendas ? Vi povas moviĝi sur la teron ! Ĉiuj bestoj estas for jam delonge.

[16] Genezo 8.11
[17] Genezo 8.11



- Vi estas la lastaj, kiel kutime. Eĉ la du testudoj estis pli rapidaj. Ek antaŭen ! Ĉesu ĝemi. Bestoj devas forlasi la arkeon duope.

La pingvenoj tenas unu la alian per la flugilo.

- Sed ni ne povas forlasi ĝin duope ĉar ni estas tri.

La kolombo ĝemas.

- Nekredeble. Ili plu ĝenas ĉiujn !
- Fakte, kie estas la dua kolombo ? demandas la pingveneto.

La kolombo gratas al si la kapon.

- La dua kolombo ?

- Jes ja, bestoj devas forlasi la arkeon duope, daŭrigas la pingveneto.

Sed la kolombo ne lasas lin fini.

- Jen mi memoras, ŝi akute krias. Dum la tuta tempo, ŝajnis al mi ke mi forgesas ion, ion gravan !
  Mi forgesis venigi duan kolombon en la arkeon ! Kaj ŝi ĵetas sin sur la plankon plorante kiel diluvo kaj levante siajn flugilojn al la ĉielo.
  Mi pensis pri ĉiu besto, sed mi forgesis trovi kolombon ! Kiel mi povas prezenti min al Noa sen kunulo ? Mi volonte disŝirus ĉiujn miajn plumojn ! Malbenita mi, kion mi faru ?

La pingveneto iom cerbumas.

- Mankas kolombo, li fine diras, sed ni havas troan pingvenon.

La aliaj gapas lin senkomprene.

- Vi ne kaptas la sencon ? li diras ridante.
- Jes, jes, jes ! Mi komprenas, ekdiras la unua pingveno.
- Ankaŭ mi, haste aldonas la dua pingveno.

La kolombo viŝas la okulojn.

- En tiu okazo, vi povas klarigi al mi.
- Mi bedaŭras, ne eblas, flustras la unua pingveno al ŝia orelo.
- Ankaŭ mi ne, mi ŝajnigis kompreni, aldonas la dua kapneante.


La pingveneto petas ilian atenton per frapo de la flugiloj.

- Aŭskultu bone ! Estas tre simple ! Neniu rimarkos ion. Ni bezonas nur…

Kaj li klarigas sian planon flustre. La birdoj interproksimigas la kapojn kaj ekscitite ekflustras. Finfine la kolombo ekkomprenas la planon.

- Estas danĝere, ŝi diras, sed Noa estas maljunulo. Lia vidpovo malkreskas, tio povas funkcii.

## LA ARKEO FORIRAS JE LA OKA



La du pingvenoj staras ĉe la supro de la ponteto, sed post tiom da tagoj en la kelo de la arkeo ili devas denove kutimiĝi al la lumo. La suno brilas. La ĉielo elstare bluas. Ie aŭdiĝas la pepado de la birdoj. Restas nur kelkaj flaketoj ie kaj tie. La du pingvenoj balanciĝante malsupreniras la ponteton, plej prudente.

Alveninte finfine sur la grundon, profunda malalta voĉo bonvenigas ilin :

- Bonvenon en la novan mondon. Sed unue demetu viajn ŝuojn.

Maljuna viro kun longa blanka barbo staras antaŭ ili.


Li apogas sin per lambastono kaj rigardas la pingvenojn tra dikaj okulvitroj.

- Sed ni ne havas ŝuojn, respondas la pingvenoj.
- Vi nigre makulas ĉie ! diras la maljunulo, montrante la ponteton per sia bastoneto.

La pingvenoj turnas sin. La ŝtupoj estas efektive kovritaj de piedspuroj.

- Ha, estas peĉo. Tio ne daŭros.
- Restas ankoraŭ du post ni, respondas la pingvenoj, montrante la ponteton per sia flugilo.

Kaj estas vere. Oni vidas du kolombojn ĉe la supro de la ŝtupoj. Du ? Jes, du. La unua estas blanka kaj dika. Ŝi surmetis nigran frakon, kiu iomete blokas ŝiajn flugilojn. Cilindroĉapo ornamas ŝian kranion.
La dua pli grandas ol la unua je unu kapo, li iomete fiŝe odoras kaj li estas tutkorpe kovrita de netravidebla blanka vualo.



Aspektante mallerte, li stumblas je ĉiu ŝtupo de la ponteto, dum la alia provas kiel eble eviti la akran vidon de la maljunulo.

- Tiuj du kolomboj renkontiĝis sur la ŝipo, klarigas la du pingvenoj. Ili enamiĝis. Ili devis ĉiam teni la manon reciproke…la flugilon fakte, do ni pensis ke pli facilos geedzigi ilin.
- Unu estas multe pli granda ol la alia, diras la maljunulo, malfide.
- Estas tute normale, asertas la pingveno. Kolombino ĉiam pli altas ol virkolombo je unu kapo.


Ekde la alveno de la paro sur la grundon, la du pingvenoj puŝas ĝin flanken, ĉar la novedzino iom fiŝe odoras.

- Dankegon pro la biletoj ! ili diras malproksimiĝante. Ni memoros tiun vojaĝon kiel elstaran tempon. Manĝoj estis tre variaj kaj la distraĵoj plenumis ĉiujn niajn esperojn !

La grupeto de birdoj preskaŭ malaperis kiam la novedzino turnas sin lastan fojon. Ŝajnas al li ke li ne sufiĉe esprimiĝis. Pro tio li malfermas la bekon kaj diras per voĉo nekutime malakuta :

- Mi malofte tiel amuziĝas kiel sur la arkeo de Noa !
- Momenton ! diras la maljunulo levante sian apogilon al ilia direkto.

La birdoj ŝtoniĝas. Neniu plu riskas movon. La sekreto estas eltrovita ! La kolombo demetas sian cilindroĉapelon, ekrigardas la pingvenojn lastan fojon, kaj malrapide trotas ĝis la maljunulo.



Ekde la komenco, ŝi ĉion fiaskis. Ne la taŭgajn bestojn ŝi invitis, ŝi kriegis dum la tuta vojaĝo, ŝi enkondukis manĝaĵon kontraŭregulare en la ŝipon, ŝi kartludis kun la sonserpentoj, ŝi eĉ aŭdacis iom dormeti, kiam grundo denove videblis, ŝi sukcesis deŝiri nur folion de olivarbo, sen paroli pri la fakto ke ŝi tute forgesis allogi duan kolombon al la arkeo, kaj fine ŝi aŭdacis alivesti pingvenon kiel kolombon, kaj, tio pleje superas la aliajn pekojn, ŝi kredis ke Noa estas sufiĉe stulta por kredi tiun fabelon. Pentante, ŝi klinas la kapon.

> - Mi ne ankoraŭ havis la okazon danki vin, diras la maljunulo. Mi konscias pri viaj atingoj. La formiko retrovis sian kunulon. La ĝirafoj resaniĝis, leonoj kviete dormis apud la antilopoj. Neniu besto manĝis alian en la ŝipo. Estas kvazaŭ mirakle. Ĉio ĉi pro via senlaca sindonemo.

La kolombo rigardas Noan kun dankema mieno. Ŝiaj okuloj pleniĝas je larmoj. Iom pli, kaj ŝi povus brakumi lin.

- Sed kial vi kunprenis tiujn du pingvenojn ? li demandas, pingvenoj scipovas naĝi !

La kolombo restas tiel silenta ke oni povas preskaŭ aŭdi la fluon de ŝiaj pensoj tra la kranio.

- Vi scipovas kion ? si kriĉas altvoĉe.
- Ha, estas vere, respondas la pingvenoj metante la flugilojn surkapen. Ni scipovas naĝi !

Pro la ĝenerala ekscitiĝo, ili ne pripensis. Sed okazis panika fuĝo. En tiaj cirkonstancoj, oni ĉiam forgesas ion aŭ alion…

- Ni eĉ bonege naĝas ! diras la novedzino per malakuta voĉo.
- Ne, ne vi, vi ne scipovas naĝi, haste diras la du aliaj pingvenoj, vi estas kolombo !
- Estas vere, flustras la novedzino, mi ne estas pingveno.

La maljunulo kapneas.

- Mi tre feliĉas renkonti vin ! li diras antaŭ ol malrapide supreniri la ŝtuparon de la ponteto.
- Ni baldaŭ denove renkontiĝos, ni esperas, ĥore diras la du pingvenoj.
- Rendevuo por la venonta diluvo ! aldonas la novedzino kun impertinenta rido.
- Ho, ne ŝercu pri tio, ĝemas la kolombo.
- Ne okazos nova diluvo, diras la maljunulo, per voĉo en kiu aŭdiĝas ioma seniluziiĝo. Dio solene ĵuris tion.
- Sed ni ne povas promesi ĉiam saĝi kiel fiŝetoj, susuras la novedzino.
- Ni faros kiel plej eble, haste aldonas la du pingvenoj, piedfrapante la novedzinon.
- Dio scias ke neniu evoluas, diras la maljunulo rigardante la piedfrapantajn pingvenojn. Nek homoj, nek bestoj. Okazos ĉiam disputoj, sed Dio promesis ne plu puni iun ajn.
- Kiel vi scias tion ? demandas la pingvenoj, rigardante la maljunulon per grandaj okuloj. Vi estas Dio, ĉu vere ?

La maljunulo longe kombas sian blankan barbon, ridante, sed li ankoraŭ ne respondis, kiam la dika kolombo ekridas :

- Sed li estas Noa, stultuloj !

Ŝi tiom ridas ke ŝi falas surdorsen. Ŝi kuŝas senmova, denove eligas tri ridaĉojn, kaj tuj poste ekronkas. Ne surprize. Dum kvardek tagoj, la kompatinda kolombo kuris tien kaj reen, ĉien sen ripozi. Je la unua okazo, ŝi tuj endormiĝis.

- Mi ne estas Dio, diras Noa flatite.
- Sed vi aspektas ekzakte kiel ni imagas, diras la pingvenoj. Maljunulo kun longa barbo…
- Multe da homoj imagas Dion, konsentas Noa, sed Dio ne estas viro.
- Virino do ?
- Tute ne ! ekkrias Noa.

Liaj koleraj okuloj lanĉas fulmojn tra liaj dikaj okulvitroj.

- Mi komprenas, diras la unua pingveno. Dio estas pli ĝuste aĵo…
- Kiel panrostilo ? demandas per facila voĉo la envolvita pingveno.
- Vi povas imagi Dion kiel vi volas, klarigas Noa, sed li estas ĉie, en ĉiu karno[18], en ĉiu besto, en ĉiu vegetaĵo…
- Momenton ! interrompas la unua pingveno. Ĉu Dio povus agnoski ke li eraris pri venigo de la Diluvo ?


Noa montras per sia bastono malproksiman ĉielarkon disvolviĝantan.

- Tiu ĉielarko estas signo de Dio. Ĝi indikas ke pluvo neniam plu daŭros tiom longe kaj ĝi neniam plu kaŝos la sunon dum tiom da tagoj.
- Ha, kiaj belaj paroloj, diras la pingvenoj rulante la okulojn. Se ili havus ĉapelon, ili demetus ĝin honore al Dio.

Kaj la pingveneto aldonas :

- Mi trovas Dion tre honesta, se li agnoskas sian eraron.

[18] Sufiĉe ofte la malnova testamento parolas pri « karno »



La pingvenoj rigardas la ĉielarkon ĝis ili havas kapturniĝon. Noa delonge jam supreniris la ponteton kaj malaperis en la arkeon.

La envolvita pingveno rigardas la dormantan kolombon.

- Kompatinda ! Ŝi maltrafis la ĉielarkon !
- Vi povas demeti vian maskoveston nun, diras la du aliaj.
- Ha, ĉiuokaze, mi perfekte fartas sub tiu aĵo.

La du aliaj rigardas lin per severa mieno.

- Vi ne estas kolombo, sed pingveno ! Estas klare, mi esperas.

La envolvita pingveno ruĝiĝas sub sia maskovesto, kaj piedfrapas la du aliajn.



Kiam pingveno piedfrapas alian, tiu ĉi ĉiam redonas la frapon, escepte se li ĵus promesis esti kvieta kiel fiŝeto.

- Atentu, se ni kverelas, baldaŭ okazos nova diluvo ! diras la unua pingveno.
- Ne, respondas la alia. Dio solene ĵuris ne plu venigi diluvon.
- Eble Dio tute ne ekzistas kaj simple pluvegis dum longega tempo, cerbumas la envolvita pingveno.
- Se Dio ne ekzistas, kial ni ĉiam multe parolas pri li ? demandas la du aliaj.
- Por ne senti nin solaj.

La du aliaj kapjesas kun mieno kunkulpa.

- Vi vere estas tre laca.

Ĝuste tiam, io fluge preterpasas.


- Papilio, ekdiras la pingveneto, ĝoje saltetante.

- Eĉ du ! krias la du aliaj, ĥore montrante duan flavan papilion.
- Ĉu hazarde temas pri mia papilio ? demandas la pingveneto.
- Kuru post li, vi vidos !

Tute ekscitite, la pingveneto balanciĝante postkuras la du papiliojn.

- Estas mia papilio, li ĝojegas, mi rekonas lin, lia maldekstra flugilo estas plu iom ĉifita.

La du aliaj pingvenoj okulsignas inter si reciproke. Kaj poste ili rigardas la kolombon kiu plu ronkas. Subite, la maskokovrita pingveno proksimiĝas al ŝi. Post demeto de sia vualo, li kisas ŝin. La kolombo malfermas la okulojn surprizite, kaj reciproke kisas.



Sed kiam ŝi konsciiĝas ke ŝi kisis pingvenon, ŝi tuj refermas la okulojn pro honto. Poste ŝi forte brakumas la pingvenon kaj premas lin sur sian koron.

Ekde tiu tago, la kolombo kaj la pingveno estas nedisigeblaj. Evidente, kelkfoje iu besto asertas ke alispeciemo ne akcepteblas. Ĉefe la du sonserpentoj ofte venas por certigi ke Dio neniam akceptintus tian kunecon. Sed la pingveno kaj la kolombo ne zorgas pri tio.

Ili trovis amon.

LA ARKEO FORIRAS JE LA OKA



# LA ARKEO FORIRAS JE LA OKA

Sur la bankizo, tri pingvenoj
(du grandaj kaj unu malgranda) cerbumas.

Ĉu Dio vere ekzistas ?

Ĉu li vere ĉion vidas ?

Ĉu li vere ordonas amason da reguloj, kaj koleras kiel
cent diabloj se oni ne obeas ilin ?

Kaj precipe, kial li venigos akvan diluvon sur la teron ?